



# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno  
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : [lentzen@senlime.org](mailto:lentzen@senlime.org)**Editeur responsable****Responso eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: [parren@senlime.org](mailto:parren@senlime.org)

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@senlime.org](mailto:hogen@senlime.org)

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj****rete elŝuteblas ĉe****[www.senlime.org](http://www.senlime.org)****Prezoj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ  
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,  
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)  
estas disigita de la abono al la  
papera versio de nia informilo (12€).**1 & 2 AUG./AOUT 2009 VAALS (NL)****Eerste Vaalser Hunnenkamp****1. Vaalser Hunnenlager****Premier camp de Huns à Vaals**

Prelego de M. Schrymecker : vidu detalojn p. 2



- Hunnenhorden / Hordes de Huns *uit / aus / de* DE + NL
- 20 jurten / yourtes
- Presentaties / Vorführungen / Présentations
- Historische Rituelen / Historische Rituale / Rituels historiques
- Dans / Tanz / Danse
- Paardrijden / Reiten / Chevauchées
- Muziek / Musik / musique

<http://www.1volser-hunnenhorde.nl/>



# Niaj programeroj lupee

## detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

### Santorini

Dum vulkana erupto (1600 antaŭ J.K.), la insulo **Kaliste** [Belega], situanta en la sudo de la **Egea** maro, 75 km for de la kontinento, estas komplete detruita kaj naskas tri insulojn : **Thera**, **Thirasia** kaj **Aspronisi**. Sekve, giganta tsunami dufoje rondiros la tutan terglobon.

La nomo **Santorini** [Sankta Irena] estas donita, al la ĉefa insulo, de la Venecianoj dum la 13a jarcento. Post la anekso de la insularo al Greklando en 1840, tiu-ĉi oficiale retrovas sian antikvan nomon: Thera.

**Santorino** aspektas kiel krescento kies alteco kreskas de la orienta marbordo ghis la centra «kaldera» (kaldrono) La vilaghoj situantaj sur la klifo (**Fira**, **Oia**), disponas pri haveneto en la kaldera alirebla tra vojeto per azenoj (eta telfero en **Fira**).

Nur la haveno **Athinios**, kie ĝenerale alvenas la vizitantoj, akceptas veturilojn. Aerhaveno akceptas etajn aviadilojn

Pro la malriĉeco de la tero, kovrita da cindroj kaj pumikoj, nur unu specifa vinkulturo eblas: la **asirtiko**, je tre eta rendimento.

En 1970 estas malkovritaj en **Akrotiri**, sub la vulkanaj cindroj kaj pumikoj, belegaj freskoj kaj ceramikaĵoj, postrestaĵoj de antikva civilizacio (minoja) el la dua jarmilo antaŭ J.K..

**04-16** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Santorini, la Kiklada perlo**", prezentota de J-M. Jacques. Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

### Hunoj en Vaals

Stranga kaj nekredinda titolo por prelego, ĉar **Hunoj** ne plu ekzistas; ili malaperis je la kvina jarcento de nia erao.

Tiuj, kiuj lernis pri tiu popolo, konas ĉefon **Attila**.

En **Vaals**, la plej suda urbeto de Nederlando, okazis por la unua fojo kvazaŭa internacia Huna kunveno.

Dank'al tiu neordinara evento ĉirkaŭ la Huna kampo dum la unua semajnfino de la monato aŭgusto multe da interesatoj ekaŭdis kaj eksciis pri la Hunoj.

Membroj de la freŝbakita Huna klubo de Vaals plezurege rakontis kaj klarigis Hunan historion al scivolemaj gevizitantoj.

Kompreneble la aktivaj geklubanoj portis vestaĵojn de la Huna epoko. La prezidanto de la Vaalsa grupo eniris la rolon de la Huna ĉefo Attila.

Por starigi vastan programon kaj realigi kampon cele konigi al la publiko kiamaniere kelkaj homoj pasigas libertempon en la rondo de falsaj Hunoj, la grupo de Vaals invitis Hunajn geamikojn el pluraj germanaj urboj - ekzemple el Kolonjo, Frankfurt,...

Same kiel la nederlandoj, la germanaj semajnfinaĵoj Hunoj entuziasme informis kaj ĝoje permesis filmi en la tendoj.

Bedaŭrinde por Attila kaj por siaj Hunoj-samideanoj, la pluvo interrompis la ceremonion de la dua tago.

La prelego enhavos historian parton pri la Hunoj kaj filmon pri la Huna dutaga festivalo en Vaals.

**05-21** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Hunoj en Vaals**", prelego de nia historiisto, Mathieu **Schrymecker**.

### Karaoke de Senlime

Estas nun konate (ĉu ne ?) ke **Senlime** regule organizas sian propran karaokeo-n en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro. Kelkajn himnojn ni ankaŭ kelkfoje kantas okaze de festoj kiel la Zamenhofa en decembro, k.t.p.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaŭ havas grandan kulturan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande... kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Post plurjara sperto, Jean-Marie **Jacques** prezentos al ni en DVD kelkajn ekzemplajn karaokeojn de **Senlime** : temas nur pri kantoj el la «publika bieno», kio signifas ke ili estas libere uzablaj sen aŭtoraj rajtoj. Do temas pri malnovaj muzikoj luditaj de Jean-Marie mem per sia sintezilo (Roland EXR-5s), prezentitaj, kune kun la kantendaj paroloj (laŭtakte silabigitaj), en filmetoj.

La DVD estos mendebla kaj surloke akirebla (kompreneble la kopirajto apartenas al J-M. Jacques, kiel interpretinto, laŭ la leĝaro).

Poste, vi kiel kutime rajtos laŭplaĉe elekti kelkajn kantojn el nia ĉiam pli kaj pli vasta kolekto.

**06-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: karaokeo de **Senlime**. Inf. <http://www.senlime.be>

# ESPERANTO

## Eŭregiona kalendaro 2010 (1/2)



**Senlime** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques ([jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)).

Pro la riskoj de vintra veteraĉo, ni ne kunvenos en januaro.



**02-19** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: **ĝeneralaj asembleoj**  
(de *Senlime* kaj E.G.V.) kaj labor-kunveno.

**03-19** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Vidpunkto pri Bosono, ŝnuraj teorioj kaj aliaĵoj**" (far' Karlo Norga).  
Inf. [norga@senlime.org](mailto:norga@senlime.org)

**04-16** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect : "**Santorini, la Kiklada perlo**", prezentota de Jean-Marie Jacques.  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**05-21** 19h30 BE-Kelmis,  
"**Hunoj en Vaals**", prelego de Mathieu Schrymecker.

**06-18** 19h30 BE-Kelmis,  
**Karaokeo.**



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **09-17, 10-15 kaj 11-19.**  
Zamenhof-festo la 12-19 (?).

Vu les risques d'intempéries hivernales, nous ne nous réunirons pas en janvier.



**19-02** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: **assemblée générale**  
(de *Senlime* et E.G.V.) et réunion de travail.

**19-03** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Point de vue sur les Bosons, les théories des noeuds etc.**" (Charles Norga).  
Inf. [norga@senlime.org](mailto:norga@senlime.org)

**16-04** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect : "**Santorin, la Perle des Cyclades**", présentée par Jean-Marie Jacques.  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**21-05** 19h30 BE-Kelmis, "**Des Huns à Vaals**": conférence de Mathieu Schrymecker.

**18-06** 19h30 BE-Kelmis,  
**Karaokeo.**



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **17-09, 15-10 et 19-11.**  
Zamenhof-festo le 19-12 (?).

# Novaĵoj pri **AMIKEJ** kaj EMRo.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

## Liège-Verviers-Aachen savota

La TGV (tre rapida trajno) de Belgio al oriento evitis la stacidomon de Verviers... kaj la "neplibonigeblan" trajnvojon inter Lieĝo kaj Akeno tra la belega valo de la rivero "Vesdre". Kompense kreiĝis internacia trajno inter Lieĝo kaj Akeno tra Verviers kaj... Kelmis, kiu tamen ankaŭ devos modernigi por pluvivi.

La lumsignalaro jam estas renovigita sed aliaj laboroj necesas dum 2010. Interalie, du tuneloj en Trooz kaj unu en Dolhain estas plibonigotaj kaj unu traknivela pasejo en Baelen malaperigota. Dum 2010, por ebligi la laborojn, noktaj kaj semajnfinaj trajnoj estas anstataŭigotaj de aŭtobusoj.

En 2011, nova materialo veturos sur la linio, ĉar la nuna ne plu taŭgos por la (moderna) germana trajn-vojararo, kaj eble ankaŭ belgaj trajnbiletaj aĉeteblos ĉe aŭtomata giĉeto en la stacidomo Akena.

## Karnavalo

Laŭ Rejna kutimo, la karnavalo de Kelmis (kiel aliaj, interalie en Eupen, Dolhain-Limbourg kaj Aalst) oficiale komenciĝis la 11an de novembro (11a monato) je la 11a horo kaj 11 minutoj (11 estas "elf" en la germana kaj tiuj tri literoj elvokas la revolucian moton «egaleco, libereco, frateco» - temis pri moko al la tiama franca teritori-okupanto).

Karnavala princo, Jose la 1a por 2010 (ve, ne temis pri la prezidanto de la Esperantista Grupo Verviersa, José JACOB !), estas nomumita 15 tagojn antaŭ la oficiala komenciĝo. Inter la 11 de novembro kaj la merkredo de la Cindroj (laŭ katolika tradicio), la vilaĝanoj de Kelmis kaj Moresnet preparas la feston, amuziĝante inter si kun lokaj artistoj, en la loka dialekto.

La surstrata karnavalo komenc-iĝas per la virina tago, la ĵaŭdon antaŭ la Cindra merkredo. Tiam la virinoj frumatene kuniĝas kaj folklore invadas la urbodomon. La urbestro donas al ili la urbajn ŝlosilojn. La virinoj tiam regas kaj simbole tranĉas la kravatton de ĉiu preterpasanta viro !

La sekvanta sabato estas la tago de la infanoj : je la 15a horo, granda infana irantaro trairas la stratojn kaj salutas infanan princeton antaŭ la urbo-domo.

Dimanĉo estas grava tago por la karnavalaj societoj kiuj, speciale vestitaj, prezentas la ĉef-majorinon al la karnaval-princo.

Sed la kulmino estas la lundo de la Rozoj, ĉi-jare la 15a de februaro. Kutime cento da folkloraj grupoj kun ĉaroj iradas tra la stratoj de Kelmis, kriante la famajn «Alaaf» dum la loka fanfaro ludas, interalie, la marŝon de **Amikejo** (sed ĉi-jare la ĉaroj ne povis veturi pro neĝo kaj glacio).

Fine, papera porko estas simbole bruligita la mardon meznokte : finiĝas la festo kaj komenciĝas la «Granda Fasto» religia.

## Beneluksa Esperanto-kongreso.

La Flandra Esperanto-ligo (FEL) okazigas de la 13a ĝis la 16a de majo 2010 Beneluksan Kongreson en Antverpeno kun lingva festivalo.

La temo de la kongreso estas "la **lingva diverseco en Beneluxo**". Dum la lingva festivalo FEL prezentos al vi i.a. la Brabantan, Frisan, Pikardan kaj Valonan lingvojn.

Plie FEL antaŭvidas nekutiman ekskurson en Antverpeno, nome tra la subtera kanalaro kaj poste reen surtere; kaj biciklan ekskurson al Saeftinge, belega natur-parko, trans la limo kun Nederlando, kaj multon pli.

FEL atendas ankaŭ partoprenantojn el ne-Benelukslandoj!

Pliajn informojn kaj aliĝilon vi trovos ĉe <http://www.esperanto.be/kongreso/>.

Komunikis Lode **Vandevelde**,  
prezidanto de FEL.

## Nova «Esperanto en marche»

Tiu-ĉi informilo estas memstare abonebla, legebla rete aŭ en «**Esperanto en marche**», la trimonata informilo de APE. Tiu lasta estas nune sukcese renovigata. Pro profesia presado, ĉiuj artikoloj devas ek de nun esti pretaj unu monaton antaŭe (do la 31an de majo por la venonta numero). Bonvolu do ankaŭ pripensi tiun regulon se vi volas aŭ devas aperigi ion en «**La Voĉo de Amikejo**».

# WAGNER en ESPERANTO

## RESUME en français

Pendant l'automne 2005, l'ORW (Opéra Royal de Wallonie) a présenté la fameuse suite de 4 opéras imaginée par R. Wagner, connue sous le nom de «*tétralogie*» ou «*L'Anneau du Nibelung*».

Cette saga poétique, philosophique et musicale, longue de plus de 15 heures, a été captée par la RTBF et diffusée en 18 épisodes de 50 minutes environ. La RTBF a apporté un «plus» au spectacle par le recours à des procédés de captation et de montage exceptionnels.

En mars 2007, **Senlime** finissait le sous-titrage du premier épisode ; voici quelques jours s'achevait le traitement de l'intégralité de l'œuvre (après plus ou moins 200 heures de travail, ce qui ne manqua pas de retarder le sous-titrage d'autres films !).

Selon nos informations actuelles, ni la RTBF ni l'ORW n'éditeront finalement l'œuvre en DVDs. On peut certes trouver dans le commerce une autre version du Ring en 7 DVDs pour la modique somme de 92,89 EUR.

Les enregistreurs de DVD devront donc fonctionner, à l'occasion d'une future rediffusion : les intéressés pourront, sur un appareil ad-hoc, utiliser ces sous-titres qu'ils se procureront sur yahoo (**Senlime** ne fournit jamais de copies - illégales - de films).

**Attention** : les sous-titres créés pour la version RTBF ne peuvent pas être joints à une autre version en raison du problème de la synchronisation (les textes en pourraient bien entendu convenir).

Dum la aŭtuno 2005, la Valona Reĝa opero (BE) prezentis la faman sekvon da kvar operoj imagitan de Rikardo Wagner, konata sub la nomo «Tetralogio» aŭ «La Nibelunga Ringo».

Tiu poezia, filozofia kaj muzika sagao, longa je pli ol 15 horoj, unuafoje prezentita en Lieĝo (BE), ne povis lasi la Radio-Televideo Belgia Franclingva (RTBF) seninteresa. Kaptado de la evento necesis.

Kaj por plivalorigi tiujn mitologiajn aventurojn, por nenion perdi el tiu senkompata mondo miksanta diojn, gigantojn, nanojn, homojn kaj aliajn drakojn - kaj unuafoje en opero - estis alvokitaj du arganoj alternantaj forajn kaj proksimajn kamerao-movojn. Ĉiu bildo liveras sian parton el ŝvito, dramo kaj emocio. Nenion malvidas la spektanto. Krome multaj planoj estis ree traktitaj dum la muntado. Tridimensiaj ŝajnoj, lumŝprucoj, plifortigo de la magia flanko de diversaj akcesoraĵoj (la oro, la drako, la spado) alportas pluson kompare kun la spektaklo vidita en teatrejo.

Resumi pri La Reĝna Oro, La Walkyrie, Siegfried kaj la krepusko de la Dioj ne estas facila tasko: mi resendas vin al aliaj fontoj.

Elsendi tiujn 4 longajn operojn sen klarigo, sen historia reliefigo, ŝajnis sensenca. La ideo dividi la rakonton en 18 epizodojn da proksimume 50 minutoj, rapide sin trudis. Laŭmodas nun la televidaj serioj. La libreto enhavas sufiĉe da revigliĝoj kaj alilokiĝoj por distranĉi ĝin en epizodojn. Kaj tiu maniero feljetone proponi operon neniam ekzistis antaŭe.

Jen granda premiero, grandega defio por la tuta teamo. Dank'al la RTBF, la tetralogio do iĝis «La Ringa Malbeno».

En marto 2007, **Senlime** finis la pritraktadon de la unua el la 18 epizodoj kaj karesis la projekton surskribi la tutan operon en esperanto... sed vane serĉis kunlaborantojn. Tamen tri jarojn poste finiĝis la laboro (tio estas pli-malpli 200 horoj!).

Pro tio iomete lamis la surtekstigado de (aliaj) filmoj dum la tri lastaj jaroj.

Laŭ miaj aktualaj informoj, nek la RTBF nek la Valona Reĝa Opero fine surlumdiskigos la tutan serion (ekzemple nune aĉeteblas alia versio de la tuta Ringo en 7 DVDoj kontraŭ la modesta prezo da 92,89 EUR).

La DVDaj kopiiloj do funkcii (jam dufoje la RTBF elsendis la tutan serion, sed certe sekvos aliaj relesendoj far' RTBF aŭ alia televido)! Por la interesiĝantoj, la surskriboj de **Senlime** PROVIZORE elŝuteblas el la dosiero "fichiers" de la yahoo-grupo pri "Amikejo".

J-M. Jacques



Atentu pri tio ke la surtekstoj verkitaj por la RTBFa versio de la "Ring" de Wagner certe ne taŭgas por spekti alian version, ĉefe pro manko de preciza sinkronizado (kompreneble la tekstoj en si mem taŭgas).



**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob  
19 Chemin de la Rostibouhaye  
4910 POLLEUR (THEUX)  
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg  
25 Rue Pierre Fluche  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques  
5 Rue Joseph Wauters  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour  
l'Espéranto (A.P.E.)  
M. Delforge  
16 Rue des Glacières  
6001 MARCINELLE

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants  
sont cordialement invités à soutenir  
notre programme d'action en versant  
dès aujourd'hui l'une des cotisations  
suivantes au compte

n°: **000-0245571-64**

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB1

(Banque de la Poste)

de:

Esperanto grupo

25 Rue Pierre Fluche

BE4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est de  
nouveau obligatoire et fixée à 10  
EUR (l'abonnement à ce bulletin en  
version «papier» s'élève à 12 € en  
raison de l'augmentation des coûts).*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2009 (EGV) 14 €**

**U.E.A. 2010 (MA) 60 €**

**Senlime** (cotisation 2010) **10 €**

en indiquant le nom du membre  
cotisant, le bénéficiaire, l'année  
**«cotisation de .... pour ....».**

## Nous luttons contre la pauvreté et l'exclusion sociale

Pour pouvoir se comprendre, les  
hommes doivent utiliser une langue  
commune ou recourir à des  
interprétations et traductions (mais,  
comme dit un proverbe italien:  
traducteur=traître!... et ça coûte!).

Il est très difficile de savoir ce que  
coûte réellement le multilinguisme.

En Belgique, le salaire net d'un  
enseignant du secondaire inférieur  
s'élève à 1856 EUR par mois (après  
15 ans de service) pour 832 heures  
de cours environ, soit 26,8 EUR par  
heure. Avec les charges sociales et  
vu le nombre d'élèves par classe,  
ça doit faire environ 2 EUR par  
heure et par élève, auxquels nous  
ajouterons 0,5 EUR pour les frais  
de fonctionnement de l'école (les  
salaires ne représentent «que» 80%  
des dépenses d'enseignement).

L'enseignement (des bases) d'une  
seule langue étrangère demande un  
millier d'heures, soit 2500 EUR par  
élève – si on tient compte de ce que  
ses parents payeront en livres,  
séjours éventuels à l'étranger, etc. :  
on n'est pas loin des **3000 EUR**.

Et ce sera d'ailleurs tellement  
«efficace» que beaucoup d'élèves  
devront, s'ils ont vraiment besoin  
d'une langue déterminée, se  
perfectionner par diverses  
méthodes et stages. Pourquoi pas  
au Céran à Spa (au moins 3355  
EUR la semaine) ?

Comme ça n'aura pas fonctionné  
pour tout le monde, il faudra quand  
même des interprètes et traducteurs  
par la suite.

**Les gens qui ne sont pas forts  
en langues étrangères disent  
des choses bien étranges...  
Prenez donc des cours  
d'espéranto !**

Ainsi, pour l'Europe :

- le coût total de la traduction et de  
l'interprétation des institutions de  
l'UE en 2005 représentait environ  
1,123 milliards d'euros (soit moins  
de 2,3 € par citoyen par an, chiffre  
qu'on cite trop souvent car...)

- les dépenses liées au  
multilinguisme représentent en fait  
plus d'un tiers des dépenses totales  
du Parlement !

- le Parlement européen traduit plus  
d'un million de pages par an... (et la  
protection des forêts ?).

Pensez aussi aux nombreux  
appareils que vous achetez,  
accompagnés d'un gros mode  
d'emploi en 5 ou 6 langues...

Et encore, nous n'avons mentionné  
que des coûts financiers, mais que  
dire des coûts humains, si on songe  
à des accidents comme celui de  
Pecrot où, faute d'avoir pu se  
comprendre, deux employés des  
chemins de fer (l'un wallon, l'autre  
flamand) n'ont pas réussi à couper  
le courant sur une ligne que deux  
trains empruntaient... en sens  
inverses !

Si la connaissance de l'espéranto  
était généralisée, on ne devrait plus  
enseigner obligatoirement qu'une  
seule langue (dont l'apprentissage  
nécessiterait dix fois moins de  
temps). Évaluez l'économie ! De  
quoi venir bien plus efficacement en  
aide au tiers- (et au quart-)monde !

**Senlime** (groupe espérantiste de  
Verviers) participera donc au  
programme «**Comment la culture  
contribue à la lutte contre la  
pauvreté et l'exclusion sociale**»  
proposé par la Direction générale  
de la Culture (réalisation de 2  
brochures et organisation d'un  
colloque-rencontre) dans le cadre  
de l'Année européenne de la lutte  
contre la pauvreté et l'exclusion  
sociale.

J-M. Jacques.